

FIDO KAJ RELIGIO SANO KAJ MALSANO EN LA SPIRITUALECO

“Neniu iam vidis Dion; la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris”(Joh.1,18). Estas per tiu ĉi nediskutebla deklaro ke Sankta Johano la Evangeliisto finas la prologon al sia Evangelio.

Neniu, skribas Sankta Johano, iam vidis Dion.

La evangeliisto konscias pri la fakto ke li tiamaniere estas kontraŭdiranta la Sanktajn Skribojn mem, la Vorton de Dio, kie klare oni deklaras ke multaj personoj vidis la Sinjoron: Moseo kaj Aaron, Nadab kaj Abihu, kaj sepdek el la ĉefoj de Izrael dum la faro de la interligo sur la monto Sinajo, “ili vidis la Dion de Izrael.... Ili vidis Dion kaj manĝis kaj trinkis”(El. 24, 10-11; 33,11; Nomb.12, 6-8; Read. 34,10).

Per sia sendiskuta deklaro la evangeliisto celas relativigi la gravecon de tiuj ĉi spertoj. Ĉiuj priskriboj de Dio kiujn oni faris antaŭ Jesuo estas, do, ĉiuj partaj, limigitaj kaj, foje eĉ malveraj.

Ekskludante ĉiujn homojn, fakte la evangeliisto ekskludas eĉ Moseon.

Ne, li ne vidis Dion, kaj pro tio la Leĝon kiun Moseo transdonis ne povas speguli la plenton de la dia volo: la Leĝo estis nenio alia ol necesa etapo por prepari la popolon al plena revelacio de Dio. Ĝia neprigo fakte igis la Leĝon la ĉefa malhelpo por atingi la konon de la vizaĝo de Dio.

La evangeliisto referencas al Dio nomante Lin Patro. Por bone kompreni tiun ĉi gravan aserton oni devas enmeti la signifon de la patreco en la tiuepokan kulturon. Dum la koncipio de la filo estas la patro kiu ĉefrolas. Estas nur el lia spermo, fekundigita en la patrina ventro, kiu naskiĝos la filo. La patro estas tiu kiu generas, dum la patrino estas kiu naskas (Jes. 45,10), kaj kies rolo estas tiu de simpla inkubatoro; ŝi nenion transdonas al la filo, kiu ricevas la vivon rekte de la patro. Pro tio, asertante ke Dio estas Patro la evangeliisto celas diri ke estas nur de Li ke la homoj ricevas la vivon, kaj ĉar ĝi estas dia vivo ĝi estas nedetrujebla, nome eterna.

Nur Jesuo, la ununura filo, pro sia plena persona kaj intima sperto, povas konigi al aliuloj kiu estas tiu Patro. Tial oni devas forgesi kion oni jam sciis pri Dio por lerni de Jesuo, “li estas bildo de la nevidebla Dio” (Kol. 1,15), kiu estas lia nura ekspliko.

La evangeliisto invitas la leganton atenti la personon de Jesuo, ĉar nur en li oni povas koni la veran vizaĝon de Dio. La frazo: “la solenaskita Filo, kiu estas en la sino de la Patro, Lin deklaris”, fakte rolas kiel ĉarniro inter la Prologo al la Evangelio laŭ Sankta Johano kaj la evangelia rakonto kiu komenciĝas. Oni ne devas ekiri de antaŭformita ideo pri Dio por konkludi, poste, ke Jesuo estas ekzakte simila al Li.

La elirpunkto ne estas Dio sed estas Jesuo. Ne estas Jesuo egala al Dio, sed estas Dio egala al Jesuo. Ĉiu ideo pri Dio kiu ne povas efektiviĝi en Jesuo estas forigenda.

De la religio al la fido.

Jesuo proponas al ni tute novan rilaton kun Dio, la Patro. Fakte la nova rilato kun la Patro kiun Jesuo proponas al ni ne povas esprimiĝi per la terminoj de la malnova interligo, laŭ la Evangelioj ĝi estas anstataŭigata tiamaniere: “Ĉar la leĝo estis donita per Moseo; la graco kaj la vero estiĝis per Jesuo Kristo” (Joh.1, 17). La eksplicita alvoko de Sankta Johano rilatas la ŝanĝon de interligo jam antaŭvidita de la profetoj Jeremia kaj Jezĥekel: “Mi donos al vi koron novan, kaj spiriton novan Mi metos en vin; Mi eligos el via korpo la ŝtonan koron, kaj Mi donos al vi koron karnan” (Jez. 36,26).

La Dio de Jesuo estas Dio-Amo (1 Joh.4,8), kaj la amo ne povas sin esprimi pere de la leĝoj sed nur pere de vivaj komunikadoj. Neniu leĝo, fakte, eĉ se ĝi estas dia, povas iam esprimi la amon de Dio, dum ĉiu amgesto, eĉ la plej homa estas resendo de la dia amo.

Estas la amo kiu kreas kaj komunikas la vivon; la Leĝo tion ne povas fari (“ĉar la leĝo nenion perfektigis”, Heb. 7,19). Dum la amo estas interna homa realaĵo, la Leĝo ĉiam estos kodo da ekstera sinteno. Dum la Leĝo estas “sama por ĉiuj”, la Spirito agas ene de ĉiu homo diversmaniere, ekflorigante en ĉiu homo liajn personajn apartajn karakterizaĵojn.

Tiun ĉi novan rilaton kun la Patro kiun Jesuo venis proponi al ni ne povas realiĝi laŭ la normoj de la religio, sed ĝi povas esprimiĝi plene en la fido.

Per la termino religio oni celas tiun aron da kredoj, sintenoj, deziroj kaj sopiroj de la homo, kiuj estas adresitaj al la diaĵo por akiri ĝian bonvolemon. En la Nova Testamento la termino religio aperas entute ununuran fojon, kaj ĝi rilatas la hebrean religion (Ili havis kelkajn demandojn kontraŭ li pri sia propra religio”, Agoj. 25, 19).

Dum per la vorto religio oni celas kion la homo devas fari por Dio, per la vorto fido, kontraŭe, oni celas kion Dio faras por la homo.

Ĝisfunde ŝanĝiĝas la rilato de la homo kun Dio.

Dum per la religio la homo vivas estante orientita al Dio kiel lasta etapo de sia ekzisto, per la fido la homo vivas el Dio, kaj, kun Dio kaj kiel Dio li estas direktita al aliuloj.

En la religio Dio ensorbis la homon disiginte lin de la aliuloj.

En la fido Dio plifortigas la homan vivon, lin puŝante ĉiam pli renkonten al la aliuloj.

La religio baziĝas sur ordonoj, devoj, ritaĵoj kaj oferoj.

La fido kiu naskiĝas el akceptado de la kreskanta amo de la Patro, sin montras pere de agoj kiuj komunikas vivon.

En la religio estas la homo kiu oferas ion al Dio.

En la fido estas Dio kiu sin ofertas al la homo.

Dum fido signifas akcepti la vivon kiun Dio komunikas al ni kaj kiu laŭgrade, sed iom post iom kaj ĉiam kreskante, evoluigas la homon plifortigante ĉiujn liajn vivecojn, la religio per ĝiaj normoj, ordonoj kaj malpermesoj subpremas la vivon de la homo, bremsas lian emociemon kaj inhibicias lian seksecon. Tiuj realaĵoj kiuj, harmonie evoluigintaj, kondukas la individuon al maturigo estas rigardataj suspekto de la religio.

Bridante la vitalajn stimulojn de la homo la religio lin misformas kaj malsanigas alvenante ĝis lin kredigi ke estas bono kio, kontraŭe, estas malbono kaj ke estas malbono kio, kontraŭe estas bono (Jes. 5,20). Fakte, en la religio, vortoj kiel "plezuro", "gusto", "ĝuo", "kontenteco", estas rigardataj suspekto, konsiderataj kiel strikte parencaj al la peko aŭ al kio estas peka kaj ĉiukaze malkongrua kun la nomo de Dio, Dio al kiu pli konvenas terminoj kiaj "sufero", "mistrakto", "malĝojo", "pento".

En la religio ĉio kio rilatas la vivon estas metata sub la kovron de la malpureco, aŭ, pli ĝuste de la ekskludo de Dio. La leĝaro pri la pureco kaj la malpureco entenata en la Libro de Levidoj (Lev.11-12.15), pritraktante la vitalajn flankojn de la ekzisto kiel la naskiĝon, la sekson, la nutradon kaj la morton, agas tiel ke, fakte, la homo daŭre sin sentas en stato de malpureco, kiu igas lin malinda kaj bezonanta sin helpi per ritajaj oferoj por atingi ateston pri leĝa pureco nur mallongdaŭra.

Fronte al neatingebla sankteco de Dio, la homo fine sin konsideris neniaĵo (Des pli homo, la vermo! Kaj homido, la tineo", Ijob 25, 6), se ne paroli pri la situacio de la virino: la menstruaĵo faris ŝin malpura sep tagojn dum kiuj ŝi ne povis havi seksajn rilatojn (Lev.15, 19), sed eĉ la normala geedza rilato faris ŝin malpura "(Kaj kiam kun virino kuŝis viro kun elverŝo de semo, tiam ili banu sin en akvo, kaj ili estos malpuraj ĝis la vespero." Lev. 15, 18) Devis esti vera dilemo por pia izraelido obei la dian ordonon "vi fruktu kaj multiĝu"(Gen. 9, 7) kaj resti pura fronte al Dio.

Jesuo forigas ĉion tion: "ekzistas nenio, kio, enirante en homon de ekstere, povas lin profani; sed kio eliras el homo, tio profanas la homon". (Mk.7,15), kaj la evangeliisto komentarias: "Tion li diris, indigante ĉiajn manĝaĵojn." (Mk. 7, 19), dementante, fakte, tion kio estis entenata en la Libro de Levidoj.

Por Jesuo la peko ne plu rilatas la dian leĝon sed la bonon de la homo. Ne estas la malobeo al iu devo kiu kompromitas la rilaton kun Dio, sed estas ja la noca sinteno al aliulo: "Kio elvenas el homo, tio profanas la homon. Ĉar de interne, el la koro de homoj, eliras malvirtaj pensoj, malĉastaĵojŝteloj, mortigoj, adultoj, avideco, malindaĵoj, ruzeco, voluptoj, malica okulo, blasfemo, aroganteco, malsaĝeco, ĉiuj tiuj malbonoj elvenas de interne kaj profanas la homon." (Mk. 7, 20- 22).

En la rilato kun la Patro proponita de Jesuo nenion plu valoras reguloj kaj religiaj devoj. La nova rilato kun la Sinjoro baziĝas sur vivkreska dinamismo pere de kiu la ricevita amo transformiĝas al komunikita amo.

La akcepto de la amo de la Patro kaj ĝia transiro en konkretaj gestoj kiuj helpas la vivon de la alia homo kunlaborante al lia ĝojo, tio permesas la progresigon kaj la harmonian kreskon de la individuo. Ju pli la homo sin malfermas al tiu ĉi ricevado de amo kaj ĝin komunikas, des pli li permesas al la Patro transdoni al li eĉ pli grandajn energiojn de amo. “Al tiu, kiu havas, estos donite” (Mk.4, 25) certigas Jesuo. La vitala komuniko flanke de la Patro estas senlima (“ne laŭmezure Li donas la Spiriton”, Joh, 3, 34), kaj ĝi estas kondiĉita nur de la kapablo de ties ricevo flanke de la homo.

El Dio povas veni nur tio kio pliriĉigas la vivon kaj ne kio ĝin malpliriĉigas, kaj ĉio kiu ne elvenas el Dio de la vivo, tio ne helpas la homon, ĝi lin malpliigas kaj malgrandigas.

La akcepto de la mesaĝo de Jesuo esprimita per vortoj “kiuj estas spirito kaj estas vivo” (Joh. 6,63), tio kapablas liberigi kaj nutri ĉiujn vitalajn energiojn kiujn la individuo jam havas ene de si mem, kondukante lin laŭgrade kaj senĉese al la pleno de lia vivo mem.

Tiu ĉi evoluprocezo ne haltas eĉ fronte al la morto, kiu, anstataŭ esti detruilo, permesas al la homo eligi la tutan povon da vitala energio kiu estas fermita en li, kiel estas esprimita per la bildo de la tritika grenero kiu nur per sia morto liberigas ĉiujn siajn povojn kaj “ĝi donas multe da fruktoj”(Joh. 12, 24).

Tiu ĉi kresko estas la ununura kriterio kiu donas al la individuo la intiman certecon esti sur la vojo dezirata de Dio:” Se iu volas plenumi Lian volon, tiu scios pri la instruado, ĉu ĝi estas de Dio, aŭ ĉu mi parolas nur el mi mem”. (Joh. 7, 17).

Sekve ĉio kio havas vivon kaj esprimas vivon, tio devenas de Dio.

Ĉio kio ne havas vivon kaj ne estas vivo, tio ne devenas de Dio.

La respondo al la vitalaj instigoj, la elfluo de ĉiuj kapabloj kaj rimedoj kiuj florigas la vivon, kondukas la homo al la lumo, tia kia lumigas lian ekziston (“la vivo estis la lumo de la homoj”, Joh. 1, 4).

Pro tio la asketaj kutimoj, tipaj de la religio, kiel pentofaroj, oferoj, rezignoj, humiliĝoj, mankas en la lingvaĝo de Jesuo kaj en la vortaro de la evangeliistoj. En la tuta mesaĝo de Jesuo entenata en la Evangelioj kaj en la cetero de la Nova Testamento estas la invito vivigi onian ekziston (Rm. 8, 11) kaj neniam ĝin humili. La ununura fojo kiam en la tuta Nova Testamento aperas la verbo malvivigi [gr. nekroò] ĝi estas uzata ne por sufoki vitalajn impulsojn, sed, male, por elradikigi mortigajn ecojn.” Malvivigu do viajn membrojn, kiuj estas sur la tero: malĉastecon, malpurecon, volupton, malbonan deziron, kaj avidecon, kiu estas idolkulto” (Kol. 3,5).

Tiu ĉi ŝanĝo de rilato inter Dio kaj la homoj efektivigita kaj plenumita de Jesuo jam estis antaŭvidita de la profetoj:” Mi deziras bonfaradon, sed ne oferon, kaj konadon de Dio Mi preferas ol bruloferojn.” Hoŝ. 6,6; Mt. 9, 13; 12,7). Kaj Jesuo pruvas ke la agordon kun Dio oni ne atingas pere de la observado de leĝoj kaj ritaĝoj (Rm.3, 20) sed pere de la similigado al lia

liberiga kaj krea amo. Pro tio Jesuo, malsame ol la malnova leĝo, neniam petas obei al Dio, sed simili la Patron (“Estu filoj de via Patro... Mt.6,45).

En la religio la homo estas vokata al sankteco (“Estu sanktaj, ĉar mi estas sankta”, Lev. 11, 44) Jesuo neniam instigas esti sanktaj, sed jes ja esti “kompatemaj kiel estas la Patro”(Lk. 6,36).

La sankteco baziĝis sur la rigora kaj zorga plenumo de reguloj kaj devoj; la kompatemo baziĝas sur la praktikado de amo kiu neniun ekskludas. Pro tio, dum la sankteco ne estas por ĉiuj, esti kompatema estas ebleco por ĉiu ajn. La sankteco postulas superi sin mem por mem spiritualigi; la kompatato postulas esti si mem sin homigante.

La sankteco disigas onin de la aliuloj, la kompatato kunigas.

La sankteco estas malproksima kaj iluzia tiom kiom estas granda la ambicio.

La kompatato eblas kaj estas tuja tiom kiom la koro estas kompatema.

La neebleco atingi la sanktecon naskas frustracion kaj konsternon.

La tuja ebleco esti kompatemaj startigas en la individuo proceson je pleno da vivo.

Jesuo venis liberigi la homon el ĉiuj tiuj reguloj, malpermesoj, ktp. kiuj estis tipaj en la religio, kiel bone komprenis la apostolo Sankta Paŭlo: “Se vi mortis kun Kristo for de la elementoj de la mondo, kial, kiel vivantaj en la mondo, vi submetiĝas al dekretoj: Ne tuŝu, ne gustumu, ne palpu, pri ĉio, kio pereas per la uzado, laŭ la ordonoj kaj doktrinoj de homoj? Ĉio tio havas ŝajnon de saĝeco en volokulto kaj humileco kaj severececo rilate al la korpo, sed ne en ia valoro por plensatigo de la karno” (Kol. 2, 20-23).

Jesuo sendiigas la transmondaĵon por diigi la homon. La ununura sanktaĵo por Jesuo estas la homo, la nura aĵo kiu povas akiri la Spiriton de la Patro.

Malsanoj kaj liberigo

Jesuo komencas sian agadon liberigante kaj sanigante la homojn kiuj estas subigitaj al la religia institucio, kiel priskribas la evangeliisto Sankta Mateo: “Kaj Jesuo trairis tra la tuta Galileo, instruante en iliaj sinagogoj, kaj predikante la evangelion de la regno, kaj kuracante ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon inter la popolo” (Mt. 4,23).

La evangeliisto rimarkigas distancigon el la judaj religiaj institucioj (iliaj sinagogoj), kie Jesuo iras ne por partopreni en la dikulto, sed por instrui, liberigante tiamaniere la popolamason el tiuj malĝustaj bildoj pri Dio encerbigitaj de la tradicia instruado. Unu el tiuj ĉi bildoj estis ke la malsanoj estas rektaj sinsevoj de la peko: “Kiu pekas kontraŭ sia Kreinto, tiu trafu en la manojn de la kuracisto” (Sir. 38, 15).

En la evangelio laŭ Sankta Johano oni legas ke, kiam la disĉiploj vidas homon denaske blindan, ili demandis Jesuon “kiu do pekis, ĉi tiu viro, aŭ liaj gepatroj, ke li naskiĝis blinda?” (Joh.9, 1-3). La blindeco ne estis konsiderata

malsano kiel la ceteraj, sed ĉar ĝi malhelpis la studadon de la Leĝo, oni konsideris ĝin kiel dian malbenon.

En la Biblio oni legas ke “Bono kaj malbono, vivo kaj morto, malriĉo kaj riĉo: ili venas de la Sinjoro” (Sir.11,14), Sinjoro kiu difinas sin mem per tiuj ĉi vortoj: “Estas Mi kiu faras lumon kaj kreas mallumon, faras pacon kaj estigas malbonon; Mi, la Eternulo, faras ĉion ĉi tion. (Jes. 45, 7) kaj certigas: “ĉu okazas malfeliĉo en urbo, se tion ne faris la Eternulo?” (Am. 3,6).

La kredo entenata en la Malnova Testamento ke Dio estas la farinto de la malfeliĉoj kiuj falas sur la homaron lasas al la homo rezignaciinta nur la eblon akcepti kion la Sinjoro sendos al li, esperante ke li ne tro peze premu per la mano: “ĉu bonon ni akceptu de Dio, kaj malbonon ni ne akceptu?” , respondas Ijob al sia edzino kiu lin riproĉas ĉar li benis la Sinjoron pro ĉiuj malbonoj kiuj falis sur lin (la Eternulo donis, kaj la Eternulo prenis; la nomo de la Eternulo estu benata.” Ijob. 1, 21. 2,10).

La konvinko ke malbonoj kaj malsanoj estas puno sendita de Dio pro la homaj kulpoj estis tiel enradikiĝinta en la tempo de Jesuo ke, kiam hebreo renkontas homon kun iu grava handikapo, tiam li benas la Sinjoron farinton de la meritita puno:”Kiu vidas mutilulon, blindulon, leprulon, lamulon, tiu diru:”Estu benata la justa juĝanto”Ben.(Berakot)58b.)

Sed se la malsano ĉiam rilatas la pekon de la homo, kiel oni povis ekspliki la suferon de la infanoj, sendube senkulpaj? Por la rabenoj la solvo estis tre simpla: la etuloj estas la propeka kapro por la kulpoj de la plenkreskuloj, kiel instruas la Sankta Biblio kaj la Talmudo kiu prezentas “Dio severa, kiu la malbonagon de la patroj punas sur la idoj en la tria kaj kvara generacioj “(El. 20,5); Kiam en iu generacio estas justuloj, la justuloj estas punataj pro la pekoj de tiu generacio. Se ne estas justuloj tiam la infanojsuferas pro la malbono de tiu tempo”.(Shab.(Sabato) 33b).

Jesuo per sia instruado kaj per sia agado dementas tiun malveran bildon pri Dio. Dio estas tiu kiu liberigas el la malsanoj kaj ne kiu ilin sendas. (“Li pardonas ĉiujn viajn pekojn, Li sanigas ĉiujn viajn malsanojn”. Psal. 103,3). Tiu ĉi liberiga agado estas la enhavo de la “bona novaĵo (gr. εὐαγγέλιον, evangelio, Mt.9.35; 24, 14; 26, 13).

La bona novaĵo estas tiu pri la Regno, nome pri la agado de Dio kiel reĝo fronte al la siaj, kiu estos esprimita fare de Sankta Mateo en la surmonta prediko (Mt.5) kaj kiu esprimiĝas per la agoj faritaj de la Kristo. La reĝeco de la Sinjoro ne konsistas en dominado de la siaj, sed en ties servado (Mt.20.28); Dio ne subigas, sed liberigas. La agado de Jesuo, “la Dio kun ni” (Mt. 1, 23) konsistos en la forpelo de tiuj malsanoj kiuj estas en la popolamaso, nome de tiuj malhelpoj el kiuj ĝi devas esti liberigita por povi sekvi la Kriston.

La famo de Jesuo etendiĝas trans la limoj de la Galilea lando, kaj ĝi atingas la paganajn landojn: ”Kaj lia famo disvastiĝis en la tuta Sirio; kaj oni alkondukis al li ĉiujn malsanulojn, malfortigitajn de diversaj malsanoj

kaj turmentoj, demonhavantojn, epilepsiulojn, kaj paralizulojn, kaj li resanigis ilin” (Mt. 4, 24). Jam komencas montriĝi regno kies limoj ne enfermiĝas en Izraelo, sed etendiĝas al la tuta homaro: ankaŭ la paganoj estas favorataj de la resaniga agado de Jesuo. La regno de Dio estas la universala etendiĝo de la amo de Dio el kiu neniu povas esti ekskludita.

Jesuo ne petas de la malsanuloj ke ili akceptu sian malsanon kiel esprimon de la dia volo, aŭ ke ili oferdonu al Dio siajn suferojn por savi la pekan homaron. Li eĉ ne diras ke tiaj suferoj estis al ili senditaj de Dio kvazaŭ kruco por porti dum la tuta vivo.

Ne.

Jesuo, simple, resanigas.

Jesuo ne prilaboras teologion pri la malbono aŭ spiritualecon pri la sufero.

Li ne klarigas ion ajn, Li agas.

Li ne teoriumas, li resanigas. Kie estas morto li komunikas vivon, kie estas malforteco li transdonas forton, kie estas malespero li inspiras kuraĝon.

La agado de la Kristo ne estas nur respondo al la helpopetoj (“Se vi nur volas, vi povas min purigi!”, Mk. 1, 40). Jesuo antaŭas la petojn de la malsanuloj, revivigante la esperon en kiu jam perdis ĉiun iluzion: “Ĉu vi volas fariĝi sana?” (Joh. 5, 6).

La evangeliistoj certe ne intencas prezenti naive la Kriston kiel ian specon de marŝanta unua sukuro, kiu sanigas ĉiun malsanon de la popolo. La verkintoj de la Evangelioj ne redaktas kronikon sed teologion, ili ne interesiĝas pri historio sed pri fido, ili ne intencas rakonti okazintaĵojn, sed komuniki verojn.

La Evangeliistoj evidentigas la situacion de deprimiĝo de la popolo kiu estas kaŭzita de la regado de la religia klaso kiu havas la povon. La religia institucio malsanigas la homojn senigante la homon je libereco kaj iniciato, malhelpante lian maturigon. La popolo ne povas permesi al si mem havi pensan kaj sintenan aŭtonomion (“Ĉu kredis al li iu el la regantoj, aŭ el la Fariseoj? Sed tiu homamaso, kiu ne scias la leĝon, estas malbenita!” Joh. 7, 48-49).

Krome, por teni ĉiam subigita kaj obeema al siaj volo la popolon, la religia institucio misformas la vizaĝon de Dio, prezentante lin kiel senkompatan tiranon pri kiu oni devas timi, Dio en kies nomo estas eble murdi, ĝis mortigi eĉ la samsangulojn por lavi la ofendon al la diaĵo, kiel ordonis Moseo post la perfido de la ora bovido: “Ĉar Moseo vidis, ke la popolo estas sendisciplina, ĉar Aaron sendisciplinigis ĝin ĝis honto antaŭ la malamikoj, tial Moseo stariĝis ĉe la pordego de la tendaro, kaj diris: Kiu estas partiano de la Eternulo, tiu venu al mi. Kaj kolektiĝis al li ĉiuj idoj de Levi. Kaj li diris al ili: Tiel diris la Eternulo, la Dio de Izrael: Metu ĉiu sian glavon sur sian femuron, trairu tien kaj reen de pordego ĝis pordego tra la tendaro, kaj ĉiu mortigu sian fraton, sian amikon, sian proksimulon. Kaj la

idoj de Levi faris, kiel diris Moseo; kaj estis mortigitaj el la popolo en tiu tago ĉirkaŭ tri mil homoj. Kaj Moseo diris: Konsekru vin hodiaŭ al la Eternulo, ĉiu sur sia filo kaj sur sia frato, por ke estu donata al vi hodiaŭ beno.” (El. 32, 25-29).

Estas la timo de Dio motivita de la religio la ĉefa kialo de la malsanoj el kiuj Jesuo resanigas la homojn. La evangeliistoj ne celas, fakte, prezenti liston de patologioj, sed, uzante la lingvon de la profetoj, ili uzas la korpajn malsanojn por indiki tiujn eĉ pli gravajn kiuj apartenas al la spirito (“Elirigu la popolon blindan, kiu tamen havas okulojn, kaj la surdulojn, kiuj tamen havas orelojn.” (.Jesaja 43, 8); “Aŭskultu ĉi tion, ho popolo malsaĝa kaj senkora, kiu havas okulojn, sed ne vidas, havas orelojn, sed ne aŭdas”. (Jeremia. 5, 21). Jesuo ne estas danĝera ĉar li rehavigis la vidon al blindulo, sed ĉar li malfermis la okulojn al la popolamaso (Joh.9).

La bona novaĵo pri la Regno pro tio estas strikte ligita al resanigo de ĉiuj malsanoj kaj invalidecoj; “Jesuo trairis ĉiujn urbojn kaj vilaĝojn, instruante en iliaj sinagogoj, kaj predikante la evangelion de la regno, kaj sanigante ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon...” Mt. 9, 35). Ekzistas strikta rilato inter la enhavo de la bona novaĵo (Dio estas amo) kaj la sano de la homoj. Kaj se la resanigo estas ago de la bona novaĵo, la kialo de la popola malsano devas esti serĉataj en doktrino kiun oni kontrabandis kiel dian volon, dum ĝi estis nur homa invento por regi kaj subigi la popolon (“Sed vane ili Min adoras, instruante kiel doktrinojn ordonojn de homoj “, Jes. 29,13; Mt. 15,9; Mk. 7,6).

La agado de Jesuo naskiĝas el lia kompatemo. Tiu ĉi ne estas sento, sed aparta agado de Dio pere de kiu la Sinjoro komunikas vivon al tiu kiu ĝin ne havas: “Kaj vidante la homamasojn, li estis kortuŝita pri ili, ĉar ili estis mizerigitaj kaj disigitaj, kiel ŝafoj ne havantaj paŝtiston...” (Mt. 9,36).

Dum sia agado Jesuo konstatas la dramecan situacion en kiu troviĝas la popolo. Dum Moseo decidis ke ĉiam estu iu kapabla homo por ke ne estu la komunumo de la Eternulo kiel ŝafoj, kiuj ne havas paŝtiston.” (Nom. 27,17; Zeĥ. 10,2), nun neniu prizorgas tiun popolon kiu, manke de iu ajn orientigo, iom post iom perdas la fortojn.

Vere ne mankis la paŝtistoj, la fakto estas ke tiuj ĉi prizorgis nur sian intereson je malprofito de tiu de la popolo pri kiu ili estis vokataj zorgi, kiel evidentigis la Sinjoro pere de profeto Jeĥezkel: “Ve al la paŝtistoj de Izrael, kiuj paŝtas sin mem! ĉu ne la ŝafojn devas paŝti la paŝtistoj? La grasajon vi manĝas, per la lano vi vin vestas, la grasigitan ŝafon vi buĉas; sed la ŝafojn vi ne paŝtas, la malfortajn vi ne flegas, malsanan vi ne kuracas, vunditan vi ne bandaĝas, forerarintan vi ne revenigas, perditan vi ne serĉas; sed vi regas super ili maldelicate kaj kruele. Kaj ili diskuris, ĉar ili ne havas paŝtiston; kaj ili fariĝis manĝaĵo por ĉiuj bestoj de la kampo, ili diskuris.” (Jeĥ. 34, 2-5).

Ĉar mankas paŝtistoj kaj la ŝafoj diskuras, oni atendus ke la preĝo de Jesuo estas por ke la Sinjoro sendu paŝtistojn por sia ŝafaro. Kontraŭe Jesuo

parolas pri laborantoj: “La rikolto ja estas abunda, sed la laborantoj estas malmultaj. Petu do la Sinjoron de la rikolto, ke Li sendu laborantojn en Sian rikolton!” (Mt. 9, 37-38).

Jesuo invitis siajn disĉiplojn lin sekvi por esti “kaptistoj de homoj” (Mt. 4,20; Mk.1,17; Lk. 5, 10) kaj ne por esti paŝtistoj. La ununura paŝtisto de la ŝafaro estas la Sinjoro (Joh.10, 11) kiu bezonas kunlaborantojn, laborantojn sed ne aliajn paŝtistojn. Kontraŭe al la reprezentantoj de la religia institucio, kiuj alproprigis al si la ŝafaron por kontentigi ilian deziron de povo, la disĉiploj estas invititaj agnoski ke la ununura Sinjoro de la ŝafaro kaj de la rikolto estas Dio (Jeĥ. 34,31), kaj ke ilia rolo kiel laborantoj estas nur tiu de kunlaborantoj, kiujn Jesuo sendas “donante al ili aŭtoritaton super malpuraj spiritoj, por elpeli ilin, kaj por sanigi ĉian malsanon kaj ĉian malfortaĵon.” (Mt.10,1).

Jesuo ne taskas la disĉiplojn pri instruado de doktrinoj, sed pri transdono de vitala forto kapabla liberi kaj sanigi. Fakte, pere de la anonco de la mesaĝo pri la Regno la disĉiploj povos liberi la homojn el ĉio kiu regas (“malpura spirito”) kaj limigas ilian vivon (“malsanoj kaj malfortaĵoj). La agado de la dekdu estos la daŭrigo de tiu de Jesuo (Mt.9,35), kiu venis por ke la homoj “havu vivon, kaj havu ĝin abunde” (Joh. 10,10), tiu estas etendiĝo de la krea agado de la Patro, faranto kaj “amanto de la vivo” (Saĝ. 11,26).

Jesuo kuracis la malsanulojn (Mt. 8,16; 9, 35), li revivigis la filinon de unu el la ĉefoj (Mt.9,18-26), li purigis leprulon (Mt.8,2-4) kaj li forpelis la demonojn (Mt.9,32). La disĉiploj estas invititaj daŭrigi la agadon de Jesuo en la nuntempo: “Kaj dum vi iros, prediku, dirante: La regno de la ĉielo alproksimiĝis. Malsanulojn sanigu, mortintojn levu, leprulojn purigu, demonojn elpelu.” (Mt.10,7-8).

“Regno de la ĉielo” estas dirmaniero kiu troviĝas absolute nur en la Evangelio laŭ Sankta Mateo por indiki la regnon de Dio (skribante al Judoj, kiam eblas, la evangeliisto evitas skribi la dian nomon kiu por ili estis ne elparolebla (El. 20,7). La regno de Dio indikas la regadon de Dio sur la homoj. Kaj la Sinjoro ne regas promulgante leĝojn kiujn la homoj devas observi, sed li regas komunikante al ili sian kapablon ami (la Spiriton) kiu kapabligas ilin ami tiel kiel ili sin sentas amataj.

Estante komuniko je amo la sendo de la disĉiploj finiĝas per la absoluta malpermeso taksii la amon senpage ricevitan. Kiel la Patro amas senkondiĉe, tiel tiu amo estu transdonita: “Donace vi ricevis, donace donu.” (Mt. 10,8).

Ĉu la sama Dio?

La tasko kiun nun Jesuo konfidas al siajn disĉiploj estas prezenti Dion malsimilan al tiu trudita de la religia institucio.

En la religio oni trudas Dion kiu timigas.

En la fido oni oferas Dion kiu forprenas ĉiun timon kaj liberigas el ĝi (1 Joh.4,18).

Kial la Dio de la religio timigas, kial liaj punoj estas teruraj? Kial Jesuo prezentas Dion kiel Patron kiu amas siajn filojn sendepende de ilia sinteno?

Kial la Dio de la religio severe punas la malbonulojn kaj la Patro de Jesuo envolvas ankaŭ tiujn ĉi kun sia amo (“Vi estos filoj de la Plejalta; ĉar Li estas bona al la nedankemuloj kaj malbonuloj.”, Lk. 6,35)?

Dio estis ĉiam la sama, li neniam ŝanĝiĝis.

Nur ŝanĝiĝis la maniero (kaj la intereso) konigi lin.

Tiu kiu per sia instruado ne intencas komuniki vivon (la gloron de Tiu kiu lin sendis), sed kiu serĉas nur sian propran gloron, tiu klinigos kaj malverigos Dion pro siaj propraj celoj. “Kiu parolas el si mem, tiu celas sian propran gloron; sed kiu celas la gloron de Tiu, kiu lin sendis, tiu estas verema, kaj maljusteco ne estas en li.” (Joh.7, 18).

Kiuj serĉas sian propran prestiĝon aŭ sian gloron, tiuj ne parolas je la nomo de Dio, sed parolas pri si mem, kaj pli aŭ malpli frue ili alvenas al misvalorigo de la homo favore de ilia profito.

Tiuj kiuj celas regi la popolon bezonas prezenti Dion dominantanta kaj kontrabandi kiel Dian Leĝon iliajn mizerajn ideojn kaj pretendojn (“vantigante la vorton de Dio per via tradicio, kiun vi transdonis;”, Mk.7,13).

La Dio prezentita de la religiaj aŭtoritatuloj estas diaĵo kiu estis alliigita kaj klinigita al la intereso de la religia kasto. Li estas diaĵo kiu pravigas la regadon sur la popolo, li estas diaĵo malamika al la homo, li estas missorĉa diaĵo kiu akceptos kiel kulton la suferon kaj la oferon de la homoj: “iu, kiu mortigos vin, opinios, ke li faras servon al Dio” (Joh. 16,2).

La baza regulo por distingi tiujn kiuj serĉas sian propran gloron mem kaj tiun de la Sinjoro estas ke la unuaj sin referencas al la Dia Leĝo, kaj la aliaj sin referencas al la amo de la Patro. Dum eblas manipuli kaj malverigi la Leĝon pro propraj intereso, la amo tion ne ebligas, kiam ĝin oni manipulas kaj malverigas ĝi ne plu estas amo, kaj anstataŭ ol disdoni vivon ĝi estas malfekunda kaj nenion ĝi komunikas.

La ĉefreligiuloj je la nomo de la Leĝo de Dio regas la popolon. Jesuo en la nomo de la amo de la Patro sim metas je la servo de sia popolo.

Jesuo kiu ne serĉas sian honoron, sed la honoron de la Patro, ne sian gloron sed tiun de tiu kiu lin sendis, li estas en plena harmonio kun la krea agado, pro tio ĉiu el liaj vortoj transdonas la riĉon de vivo kiun ĝi entenas kaj ĝi ne estas simpla malplena sonoro (“Se mi parolus la lingvojn de homoj kaj anĝeloj, sed ne havus amon, mi fariĝus sonanta kupro aŭ tintanta cimbalo”, I Kor. 13,1).

La Dio de la religia institucio estis diaĵo ekstreme postulema fronte al kiu neniu povis kuraĝi sin prezenti “kun malplenaj manoj” (El. 34,20; Read. 16,16), li estis avida Dio kiu pretendas la frukton de la homa laboro (“Ĉiu dekonaĵo el la tero, el la semitaĵo de la tero, el la fruktoj de la arboj apartenas al la Eternulo; ĝi estas sanktaĵo de la Eternulo.” Lev. 27,30) kaj ĉiuspecajn oferojn pro sia kulto (Jeĥ. 46, 13,17).

Por trudi siajn sistemojn kiel dian leĝaron la ĉefreligiuloj devis prezenti la bildon de Dio preta severe puni kiun ajn estis malobeinta eĉ la plej malgrandan ordonon.

En la ĉapitro 28 de la Libro Readmono estas listigita kvindeko da malmeno, kiuj trafos la malobeantojn je la pastraj leĝoj cirkuligitaj kiel dia volo.

“Sed se vi ne aŭskultos la voĉon de la Eternulo, via Dio, penante plenumi ĉiujn Liajn ordonojn kaj leĝojn, kiujn mi transdonas al vi hodiaŭ, tiam venos sur vin ĉiuj ĉi tiuj malbenoj kaj atingos vin “ Read. 28,15).

La listo de la diaj malbenoj estas sangofrostiga kaj entenas ĉion (“La Eternulo frapos vin per ftizo kaj per febro kaj per malsaneca varmego kaj per brulumo kaj per sekeco kaj per bruliga aero kaj per flaviĝo de la kreskaĵoj; kaj ili persekutos vin, ĝis vi pereos... La Eternulo frapos vin per abscesoj de Egiptujo kaj per sangaj ulceroj kaj per favo kaj per skabio, de kiuj vi ne povos resaniĝi. La Eternulo frapos vin per frenezeco kaj per blindeco kaj per senkapableco... Kaj vi frenezigos de la vidaĵo antaŭ viaj okuloj, kiun vi vidos. La Eternulo frapos vin per malbonaj ulceroj sur la genuoj kaj sur la tibikarnoj, ulceroj, de kiuj vi ne povos resaniĝi, de la plando de via piedo ĝis via verto”, Readm. 28,22. 27-28. 34-35). La Sinjoro tie aperas kiel Dio kruela, senkompata, ne nur nesentema al la suferoj kiujn li trudas, sed kiu pro ili plezuriĝas:“Ĝojos la Eternulo, pereigante vin kaj ekstermante vin” Read. 28,63).

Sed se la timo je Dio estas efika ilo en la manoj de la ĉefreligiuloj por regi kaj subigi la popolon, la timo malhelpas la kreskon de la homoj, kiuj restas paralizitaj de la ideo mem povi erari kaj tiel meriti punojn tiom terurajn.

Kiu vivas en la timo aŭ en la teruro je Dio, tiu neniam malkovros nek spertos la amon de la Patro, de la Dio kiu estas amo: “Timo ne ekzistas en amo; sed perfekta amo elĵetas timon, ĉar timo havas turmentegon; kaj timanto ne perfektigas en amo” . (I Joh. 4,18).

Vivo senutila

La ruiniga efiko de la timo je Dio sur la homoj estas efike skizita de Jesuo en la parabloj de la talantoj en Sankta Mateo (Mt. 25, 14-30) kaj de la oraj moneroj en Sankta Luko (Lk. 19, 11-27).

En tiuj ĉi parabloj la bildo de Dio estas prezentita kvazaŭ kiel bildo de bonhava homo, eksterordinare sindona, kiu, antaŭ ol foriri pro vojaĝo,

transdonas al siaj funkciuloj ĉiujn siajn havaĵojn, donante al ĉiu laŭ lia kapablo, al iu kvin, al iu du, al iu unu talanton (kiu ricevis nur unu talanton tiu ne ricevis malmulte, ĉar talanto egalas preskaŭ 26-36 kilogramojn da oro, kaj egalas preskaŭ sesmil denarojn, nome dudek jarojn da salajro de laboranto (Mt. 18,14).

Sekve la riĉulo transdonas al siaj funkciuloj grandan havaĵon fidante nur je iliaj kapabloj, sen postuli interŝanĝe iun ajn garantion.

“Kaj tiu, kiu ricevis la kvin talantojn, iris kaj negocadis per ili, kaj gajnis pluajn kvin talantojn. Tiel same ankaŭ tiu, kiu ricevis la du, gajnis pluajn du. Sed tiu, kiu ricevis la unu, foriris kaj fosis en la tero, kaj kaŝis la monon de sia sinjoro”.(Mt.25, 16-18). Kiu ricevis kvin talantojn ilin tuj investas, laborpenante ĝis li atingas la gajnon de aliaj kvin talentoj. La unua funkciulo transformas la monsumon kiun oni transdonis al li gajninte tiamaniere la saman monsumon kiun li ricevis. Tiel agas ankaŭ kiu ricevis du talantojn. Tiuj kiuj faras el sia vivo mem donacon de amo, engaĝante ĉiujn siajn kapablojn por la aliuloj, ĝuste tiuj spertas la veron de la vortoj de Jesuo: sin doni ne signifas perdi sed gajni.

Kontraŭe al la unuaj du, la tria funkciulo, male, enterigas la talanton ĉar li ne opinias ĝin kiel sian sed de la mastro. En la parabolo Jesuo evidentigas ke tiu ĉi tria ulo jam montriĝas kiel malfeliĉa estulo: li ne kredas je la malavareco de la mastro, li ne kredas je sin mem kiel adresiton de la donaco, li ne scias kion fari per tio kion li ricevis. Li havas en siaj manoj veran riĉaĵon, li havas eblecon fariĝi riĉulo sed li tion ne kapablas kompreni, li ne scias kapti la okazon.

La enterigo de la talanto memorigas la morton kun ĝiaj ritoj. La dramo de tiu ĉi servisto estas tiu ke li ne kapablis alproprigi al si sian vivon mem kaj ĉion kion ĝi implicas: la bonon kiun li ricevas li enterigas, enterigante kun la talanto ankaŭ sin mem.

Kiam la mastro de tiuj funkciuloj hejmenrevenas ne nur li ne pretendas la redonon de tio kion li donacis al ili, sed li ilin vokas kunpartigi kun li ĉiujn liajn havaĵojn (“mi starigos vin super multaj; envenu en la ĝojon de via sinjoro “ Mt.25,21) sin montrante, tiamaniere nekredeble kaj ege malavara. Eniri en la ĝojon de la sinjoro signifas ke finiĝis la distingo inter la dungitoj kaj la mastroj, ne plu ekzistas servantoj kaj mastroj, sed nun ĉiuj estas sinjoroj.

La agado de la mastro ne celas al lia intereso kaj gajno, sed ĝi celas al tiu de liaj funkciuloj, kun kiuj li volas kundividi ĉion kio li estas kaj ĉion kion li havas. Du fojojn la mastro fronte al tio kion faris siaj dungitoj diras “bone!”, priĝuante tion kio realiĝis, kiel en la rakonto pri la kreo, kie Dio admiras sian agadon (Gen. 1,4.10. 12. 18. 21. 25. 31).

Jesuo, per tiuj ĉi vortoj, volas komprenigi kiaj estas la efikoj de la dia agado en tiu, kiu tute fidus je la Sinjoro.

Sed estas surprizo: “Kaj venis ankaŭ tiu, kiu ricevis la unu talanton, kaj diris: Sinjoro, mi sciis, ke vi estas severa homo, rikoltanta, kie vi ne semis, kaj kolektanta, kie vi ne disŝutis” Mt.25,24). La tria funkciulo ne sin turnas al la mastro kiel la aliaj du; li ne diras: ”jen mi gajnis kvin/ du talantojn...”, sed “mi sciis ke vi...”, asertante ke li bonege konas lin, kaj li estas la ununura kiu motavigas sian agadon.

La malsimileco de opinioj inter la du unuaj funkciuloj kaj la tria, puŝas onin sin demandi ĉu ili estas traktantaj kun la sama mastro. Dum la unuaj du fidas la malavarecon de sia mastro, la tria timas lian senkompaton. Tiu ĉi lasta funkciulo havas malsaman kaj torditan bildon pri la mastro, li opinias ke li estas homo avida kaj kruela, kiu kolektas kaj rikoltas kie li ne semis nek disŝutis.

La malvera bildo kiun la funkciulo havas pri sia mastro, la timo rilate al li, la timo pro ĉiu ajn risko kondukas lin enterigi kion li ricevis: “kaj mi timis, kaj foriris, kaj kaŝis vian talanton en la tero; jen vi havas vian proprajon.”(Mt.25,25).

La homo ĉion antaŭgardis.

Lia timo estas kohera kun la vidpunkto el kiu li vidas sian mastron. Tiu ĉi funkciulo ne kapablas kompreni la karakteron de mastro kiu pretas kunpartigi ĉiujn siajn havaĵojn kun siaj dungitoj.

Li opinias ke li konas sian mastron, sed li multege eraras, la aliaj du, anstataŭe, montras tute malsaman sintenon: tiuj ĉi kredas je la malavareco de sia mastro kaj tion faros ilin ĝojaj.

Laŭ la rabena juro, kiu enterigis la monon kiun oni konfidis al li, tiu ne devis ĝin redoni aŭ repagi kaze de ŝtelo (B.M.42a). La tria funkciulo volis sin antaŭgardi, kaj povi, tiamaniere, sin defendi kaze de riproĉo, lia vivo estas reguligita de la leĝoj. Teni sin zorgoplene ĉe la reguloj donas al li sekurecon. Tiu ĉi malĝoja individuo ne perdis kion oni konfidis al li, kaj li tute ĝin redonas, sed senfruktan. Samkiel lia vivo.

La instruo de la parabolo estas ke malvera bildo pri Dio povas bloki la evoluprocezon de la homo, kiu timante erari (peki) nenion riskas, do ne fruktigas la ricevitajn donacojn. Tiu ĉi homo ĉiam vivos en la timo erari, pro tio li bridos siajn vitalajn impulsojn, startigante tiamaniere ruinigajn mekanismojn de subpremado, kiuj definitive blokos lian progresigon kaj kondiĉos lian psikon. Vokita esti plenkreskulo (Mt. 19,21), kiu vivas timante Dion ĉiam restos kvazaŭ infano, ĉiam bezonanta aŭtoritatan “patron” kiu ordonu al li kion fari kaj kiel fari kaj al kiu esti subigita. Tiu ĉi obeo al la religiaj aŭtoritatuloj estos la vitala sekureco por tiuspecaj homoj, kiuj ĉiam vidos proponojn pri libereco kiel atencon al sia propra paco.

Dum la unuaj du funkciuloj preparolas la ricevitan talanton kiel siajn proprajojn (vi komisiis... mi gajnis”), la tria neniam konsideris ĝin kiel sian proprajon; tio estas substrekita ja du fojojn per la ripetado de la pronomo (“via talento...”).

“Sed la mastro diris al li:” Vi malbona kaj mallaborema servisto, vi sciis, ke mi rikoltas, kie mi ne semis, kaj kolektas, kie mi ne disŝutis, pro tio vi devus doni mian monon al la bankistoj, kaj veninte, mi ricevus mian proprajon kun procento.” (Mt. 25, 26-27).

La mastro riproĉas tiun ĉi sian serviston nomante lin “malbona kaj mallaborema”: estis lia timo erari kiu blokis lian kreskon. Sed ripetinte la priskribon donita de la funkciulo la mastro ĝin formulas kiel demandon, ĉar li ne sin rekonas en tiu negativa bildo, kaj en sia demando la mastro preterlasas la esprimon “severa homo”.

La mastro riproĉas la serviston ĉar, tiom pli prave, sciante ke li devos pritrakti kun avida mastro, li estis devinta fruktigi la ricevitan talanton donante ĝin al la bankistoj. Sed la risko, eĉ kiam ĝi estas minimuma, ne apartenas al la mensa skemo de tiu kiu timas erari kaj, poste, povi esti riproĉata.

La verdikto de la mastro estas surpriziga: “Forprenu de li do la talanton, kaj donu ĝin al tiu, kiu havas la dek talantojn” . (Mt.25, 28).

La funkciulo ne estas punita ĉar li faris ion malbonan, sed ĉar li nenion faris.

Kial lasi al servanto donacon kiun ne nur li ne utiligis sed kiu ĵetis lin en la angoron?

Tiu ĉi individuo estas “malbona kaj mallaborema” ĉar li enterigis sin mem kune kun la talanto. Li vivis en la teruro malgraŭ la ricevita donaco. Estas pli bone forpreni de li tiun donacon, kiu fariĝis por li tiom peza kaj angoriginta.

La motivigo de la mastro estas “Ĉar al ĉiu, kiu havas, estos donite, kaj li havos abundegon; sed for de tiu, kiu ne havas, eĉ tio, kion li havas, estos prenita” (Mt.25,29).

Al tiuj kiuj fruktigas la ricevitajn donacojn estas pligrandigita la kapablo produkti laŭ mezuro kiu ne dependas de la strebado de la homo, sed de la malavareco de la Sinjoro. Se estas vero ke tiu kiu ricevis kvin talantojn ilin duobligis per sia engaĝiĝo, estas eĉ vero ke la respondo de la mastro, kiu lin vokas apartigi ĉiujn siajn havaĵojn, ne estas proporcia al la engaĝiĝo de la funkciulo, sed ĝi devenas el la malavareco de la mastro.

Dio donacas vivon al tiu kiu produktas vivon, sed li povas nur konstati la mankon de vivo en tiu kiu ne sin donis al aliuloj: “Kaj elĵetu la senutilan serviston en la eksteran mallumon; tie estos la plorado kaj la grincado de dentoj” (Mt.25,30).

Li estas senutila servanto, li estas senvalorulo; li restas sen donaco kaj sen ĝojo.

Vivante en la timo li restis enfermita en sia mallumo, pro tio nun li estas elĵetita en la eksteran mallumon, kie li povas elmontri siajn proprajn sentojn de doloro (plorado) kaj de kolero (grincado de dentoj), bildoj per

kiuj oni indikas la fiaskon de sia vivo mem. Ĉar li ne kapablis preni la oferadon de riĉaĵo kaj ĝojo, restas al li nenio por fari ol rikolti la koleron kaj la punon.

La evangeliisto Sankta Luko en la sama parabolo enmetas apartan detalon: la viro kaŝis kion li ricevis en “tuko” la greka termino tradukita per la vorto “tuko” estas **σουδαριον** (mortotuko), kiu en la evangelioj aperas nur en tiu ĉi parabolo laŭ Sankta Luko kaj en la evangelio laŭ Sankta Johano (Joh. 11, 44; 20,7), ĝi estas ĉiam ligita kun kadavroj. La mortotuko estas fakte la tuko per kiu la hebreoj vualis la vizaĝon de la mortinto por kaŝi ties putriĝon.

La denunco de la evangeliisto estas drama; kiu ne direktas sian vivon al la aliuloj, tiu jam troviĝas en mortkondiĉo, eĉ se de ekstere li povas aperi blankega kaj senmakula kiel la mortotuko kiu vualas la vizaĝon de la mortinto, ĝi estas tuko kiu utilas nur por kovri vivon jam putriĝintan.

La vivo, por esti tia, postulas kreskan dinamismon kaj senĉesan transformon, kiuj estas vivtenataj de la malfermiĝo al novaj situacioj kaj de la oferdonemo de novaj respondoj al la bezonoj de la homoj. Homo kiu pripensas nur sin mem kaj ne la aliulojn, kiu vidas nur siajn bezonojn kaj siajn necesojn, sen ekkonscii la bezonojn kaj la necesojn de la aliuloj, tiu ĉi jam vivas en mortkondiĉo. Jesuo tion eldiris pli ol klare: “Kiu trovas sian vivon, tiu ĝin perdos; kaj kiu perdos sian vivon pro mi, tiu ĝin trovos” (Mt. 10, 39; Lk.17, 33).

Tia estas la tragedio de la religio, anstataŭ helpi la kreskon de la homoj ĝi limigas ĝin, anstataŭ direkti la homajn fortojn ĝi ilin sufokas kaj, encerbigante la kulposenton kaj la malindecon, ĝi ne permesas al la homoj vivi la vivon en ĝia pleno.

Kaj tia estas ankaŭ la bona novaĵo de Jesuo, ke la Kristo venis oferdoni al la homoj kaj pro kiu li pagis per sia vivo mem: Dio estas amo, kaj neniu homo en la mondo kia ajn estu sia vivkondiĉo aŭ sia sinteno, povas sin senti eskludita el tiu ĉi amo aŭ rifuzita de la Patro, kiel bone eldiros Sankta Petro (“Dio min admonis, ke mi ne nomu ian homon profana aŭ malpura”, Agoj. 10, 28) kaj kiel majstre estos eldirite de Sankta Paŭlo en sia Letero al la Romanoj:

Kion do ni diru pri ĉi tio?

Se Dio estas por ni, kiu estas kontraŭ ni?

Ĉu Tiu, kiu ne indulgis Sian propran Filon, sed fordonis lin por ni ĉiuj, ne donos al ni libere ĉion kun li? Kiu akuzos la elektitojn de Dio?

Dio estas la justiganto!

Kiu estas la kondamnanto? Kristo estas tiu, kiu mortis, sed leviĝis el la mortintoj, kiu estas dekstre de Dio, kaj ankaŭ propetadas por ni.

Kiu apartigos nin de la amo de Kristo?

Ĉu aflikto, aŭ turmento, aŭ persekutado, aŭ malsato, aŭ nudeco, aŭ danĝero, aŭ glavo?

Kiel estas skribite: Pro Vi ni estas mortigataj ĉiutage; Oni rigardas nin kiel ŝafojn por buĉo.

Sed en ĉio tio ni supervenkas per tiu, kiu nin amis.

Ĉar mi konvinkiĝis, ke nek morto, nek vivo, nek anĝeloj, nek aŭtoritatoj, nek estantaĵoj, nek estontaĵoj, nek potencoj, nek alteco, nek profundeco, nek iu alia kreitaĵo povos apartigi nin de la amo de Dio, kiu estas en Kristo Jesuo, nia Sinjoro” (Rom. 8, 31-39).